

# EKO 2023

**Pensu globe  
Agu loke  
Por la landa,  
Fakaj kaj  
Regiona  
Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko**



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,  
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

**EKO 2023 / 30. Majo 25?, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Pezo: Sume:" 890 KB**

## AMO-seminaroj en la centa jubileo kaj poste

Ok jarojn post la lanĉo de la seminarioj en marto 2014, ni atingas la centan



**AMO 100: HU, Tiszafured, jun: "Esperanto agante en la 21-a jarcento".**

**AMO 101: LV, Ventspils, jul: "Pli dinamika medio por baltaj esperantistoj."**

**AMO 102, IT, aŭg: Lignano, Sabbiadoro: "Tradicio de la Kongresoj de ILEI."**

Ĉiuj el tiuj seminarioj estos hibridaj. Ĉiuj havas aŭ havos lumbildajn prezentaĵon, peteblaj de SMG. En aktiva preparo flanke de la AMO-Komisiono, ni planas pliajn seminariojn ĝis la UK 2024 en Aruŝa, Tanzanio.

## Ekestu oficejo pri multlingvismo en Eŭropo

Renato Corsetti dissendas tekston en la Hungara, kiu pledas por akceptigo en Hungario kun la celo peti, ke EU starigu oficejon pri multlingvismo. Por pli da informoj iru al [https://uea.org/vikio/Informado\\_supren](https://uea.org/vikio/Informado_supren).

La mesaĝo havas instigon al pliaj landoj tradukigu la tekston al la propra lingvo kaj uzi ĝin en la laboro konigi la peton kaj starigi propran agadon cele al la starigo de tiu oficejo. La projekto estas jam sendita de EEU ial 109 eŭro-parlamentanoj.

## Nitobe Simpoziumos en Torino

Temas pri la 9-a Nitobe-Simpozio en Torino. La simpozio okazos de la 28-a kaj 29-a de julio 2023 (tuj antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto). La simpozia temo: 'Post 75 jaroj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kia estas la stato de efektivigo de lingvaj rajtoj?' La simpozio okazos en la Universitato de Torino, Centro

Aldo Moro, Via Verdi..Prizorgos la simpozio Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo(CED), Ulstera Universitato kaj Universitato de Torino. kun financa subteno de: Esperantic Studies Foundation; Asocio "Nitobe" - lingva demokratio kaj justeco kaj la Universitato de Torino.

Praktike, la organizantoj estas Michele Gazzola, Nicole Marinaro kaj Maria Margherita Mattioda

La simpozio estas momento de pripensado kaj diskuto pri temo kiu akiris konsiderindan gravecon en la lastaj jaroj pro multaj kialoj, inkluzive de la kreskantaj internaciaj migradoj, la procezoj de kultura kaj lingva homogenigo ligitaj al tutmondiĝo kaj la cifereca revolucio, kiuj malfavoras la lingvojn minoritatojn, kaj fine situacioj de armita konflikto en plurlingvaj landoj kiel Ukrainio. La Nitobe Simpozio dediĉos specifan sesion al la kazo de lingvaj rajtoj en Italio, inkluzive de tradiciaj minoritatoj kaj tiuj devenantaj el enmigrado.

Jen provizora listo de prelegantoj (laŭ alfabeto ordo):

- Agresti Giovanni, Universitato Bordeaux Montaigne
- Archibald James, Universitato McGill/Universitato de Torino
- Barni Monica, Universitato por fremlandanoj de Sieno
- Clément-Wilz Laure, Universitato Parizo-Est Créteil
- Climent-Ferrando Vicent, Universitato "Pompeu Fabra", Barcelono
- Fenollar i Sastre Vicent, Politika respondeculo de NPLD (reto por antaŭenpuŝi lingvan diversecon)
- Fiorentini Ilaria, Universitato de Pavia
- Grin François, Universitato de Ĝenevo
- Häggman Johan, Konsilanto de FUEU- Federala unio de eŭropaj naciecoj
- Hult Francis, Universitato de Marilando, Baltimora
- Lainio Jarmo, Vicprezidanto de la Komitato de Fakuloj de la Eŭropa Ĉarto por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj
- Ó Riain Seán, Eŭropa Esperanto-Unio
- Phillipson Robert, Kopenhaga Komerca Universitato
- Skutnabb-Kangas Tove, Åbo Akademio
- Stango Antonio, Prezidanto de FIDU (Itala federacio de homaj rajtoj)
- Wickström Bengt-Arne, Universitato Andrassy de Budapeŝto

La laborlingvoj estas Esperanto, la angla kaj la itala. Samtempa interpretado haveblas. Por aliĝi, skribu al Nicole Marinaro [Marinaro-N@ulster.ac.uk](mailto:Marinaro-N@ulster.ac.uk). Aliĝo estas senpaga.

Michele Gazzola, [www.michelegazzola.com](http://www.michelegazzola.com)

## Hispanio ankaŭ muzikadas kaj kursumas

"Mi putinas" de Inocencia Montes  
per la voĉo de Ana Manero kaj la traduko de Miguel Fernández  
<https://youtu.be/pFvEQIW3Qzo>

-----

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: IES Marqués de Comares  
Gvidantonomo: Juan Diego Díaz Bautista

Tipo: Nova lerneja kurso

Loko: Lucena, Hispanio

Aldoninto: juandiegoazbau


Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27529>

Mga

## Cent jaroj kun hungara biero

Esperanto estas 100-jara ĉi-jare en la hungara urbo Dombóvár. Ankaŭ estos prezentita la Esperanto-biero el Dombóvár: 20-an de majo 2023

[Kissler sörfözde - Wikipédia](#); [Bierfarejo Kissler - Vikipedi](#)



## Hans Bakker restas en la memoro

Iom da memorigo pri la afrika agado de la nederlanda Hans BAKKER montras kiom Togolando, Ganao, Benino, Niĝerio kaj Kotdivuaro kunlaboradis ekde la jaro 1990.

Esperantistoj el tiuj landoj kune okazigis la tri unuajn AKE: 1990 en Togolando, 1991 en Benino, 1993 en Ganao.

Plie, togolandaj kongresoj partoprenadis esperantistoj en tiuj landoj, kaj ankaŭ togolandaj esperantistoj partoprenis la unuan kaj ghis nun solan nacian kongreson en Benino en 2005. Seminarioj diverse okazadis en Togolando kun partopreno de Esperantistoj el tiuj landoj. ACE nun taskas al si kunlabori kun esperantistoj ke tia kunlaborado pluestu. Tial ĝi petas de tiulandaj esperantistoj rilati kun ĝi ke nun estu starigita laborplano por la daŭrigo alimaniere de la afrika agado en ĉi tiu chi afrika parto

ACE, Togolando

## Sophia Mensen en la memoro

En januaro 2023 forpasis en Nederlando Sophia Mensen. Ŝi estis Cseh-instruistino, gvidanto de kursoj en Nederlando, Francio kaj Germanio. Antaŭe ŝi aktive agadis en ILEI. Ŝi en la sepdekaj jaroj instruis Esperanton ankaŭ en la Montessori lernejo, kies direktorino ŝi estis. Meze de la 70-aj jaroj s-ino Mensen kontribuis kun siaj 21 lernantoj el Soest al la fama dujara lerneja eksperimento, organizata de Szerdahelyi, cele al la scienca pruvo de la propedeŭtika valoro de Esperanto. Partoprenis en ĝi dek unu lernejoj: St. Gerard (Belgio), Hannebont kaj Le Mans (Francio), Soest, Waalwyk kaj Wormer (Nederlando), Ateno (Greklando nur dum unu jaro), Peine, Balge kaj Dollbergen (Germanio) kun entute 327 lernantoj. Pri la tuta eksperimento legu ĉe la raporto de Helmuth Sonnabend titolita Esperanto: lerneja eksperimento. Multajn el la instruhelpiloj, kreitajn de Sofino, ŝi



jam antaŭ pluraj jaroj donacis al la redaktoro de edukado.net, kaj nun ĉiuj ŝiaj Esperanto-libroj estas transprenitaj. Ili riĉigas la kolekton de nia retejo kaj ties redaktoro, parte servos ankaŭ kiel librodonaĵoj por diversaj agadoj. Sofino Mensen jam de 2010 estas en la Panteono de edukado.net (<https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=62>), kie vi povas postlasi memordensojn. Laŭ informoj de <edukado.net>

Fonto: IPR 2023/2

## Nov-Zelando, Aŭstralio kaj Norda Ameriko

La projekto <Landa Parad'> de UEA, prizorgata de via EKO-redaktoro, <SMG>, donas aktualajn informojn pri Esperanto laŭlande. Nun pretas la dokumento pri la regiono 'Pacifiko', kiu prezentas informojn pri Aŭstralio, Nov-Zelando, Kanado kaj Usono, Kiel ĉiam ni donas informojn pri la dato de lasta modifigo, por ke vi komprenu kiom aktuala estas la informoj. La alkroĉita PDF-dokumentoj estas sveltigitaj, por pezi nur 533 KB.

## La Esperanto-Tago: la aŭgusto en 15 lingvoj.

La traduko estas preta en la lingvoj: **angla, dana, Esperanto, germana, hispana,**



**hungara, irlanda, itala, nederlanda, persa, portugala, rumana, slovena kaj sveda.** Tio en la humila opinio de SMG estas tre bona rezulto, Jen grava leciono: la Tago de Eo bezonas ses-monatan preparadon!

La ĉefaj mankantaj lingvoj estas:

**kroata, pola, bulgara, franca, china, japana, barata (pli ol unu lingvo bonvenas) kaj la araba. Mi dissendis iinstigon por aktivuloj el tiuj lokoj liveri tradukon.**

Partoprenu en la festado kaj konigo de Esperanto en julio!

===== vortoj: 920 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>. ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 20.).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@uea.net>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.